# ★ Litova E-informilo ★

N-ro 1,   2017 januaro

Ĉu vi multon faris pasintjare? Ĉu vi helpis diskonigadi Esperanton ĉe via regiono, kie vi loĝas? Aŭ, ĉu vi estis eĉ nur bona persono en la jaro 2016? Ja oni diras, ke nur bonuloj ricevas donacojn sur la kristanska arbo. Do, se vi ne estis tia, konsideru pri tio ĉi-jare. Amikigu tutan mondon. Faru ion bonegan sekvontjare. Feliĉan 2017-jaron!

## Nova E-gazeto el Litovio

Ĉi tiu gazeteto, kiu nomiĝas Litova E-informilo, estas nova sendependa projekto por revivigo de la Litova Esperanto-ĵurnalismo. Ĝi ne estas organo de la Litova Esperanto-Asocio (LitEA). Ĉiuj litovoj-esperantistoj povas sendi artikolojn pri Esperanto-okazaĵoj, litova kulturo, ĝiaj interesaĵoj, ktp. Ankaŭ eksterlandanoj povas sendi novaĵojn pri iliaj E-eventoj, novaĵoj, aliaj.

La nomo, kiun ĉi tiu gazeteto havas nun, ne estos longedaŭra. Vi, legantoj, estas invitataj elekti novan nomon, kaj tiel helpi al ni redakti ĉi tiun gazeteton samkiel sendi artikolojn. Se vi havas proponojn por la nomo de ĉi tiu gazeteto, bv. sendi tiun proponon al la retpoŝtadreso de la redaktoro de gazeteto.

Ĉiujn numerojn de ĉi tiu gazeteto vi povas atingi ankaŭ ĉe la baldaŭ pretigota retejo *esperanto.96.lt.*

Via redaktoro
Urseĉjo (Povilas Jasiūnas)




## Planoj de Litova E-informilo

- Plibonigi kvaliton de gazeteto.
- Diskonigi gazeteton por pligrandigi legantaron.
- Revivigi E-ĵurnalismon kaj E-eldonadon en Litovio.

## Tradiciaj LitEA kongreso kaj Zamenhof-Tagoj 2016



Kiel kutime, ankaŭ ĉi-jare, la 10-11an de decembro, 2016, en Kaŭno okazis tradiciaj LitEA kongreso kaj Zamenhof-Tagoj 2016 (ZT-2016).

Ĉi-jare en ZT-2016 partoprenis 129 esperantistoj el 15 urboj de Litovio kaj 4 gastoj el Latvio. Dum LitEA kongreso kaj ZT, estis temitaj sukcesaj 52aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-52), aliaj E-okazaĵoj, kiel jam jubilea 40a Boatado, ĵurnalista kaj katolika renkontiĝoj, „Rideto“ en Šiauliai,

ktp. Dum BET-52, kiuj okazis en Birštonas, partoprenis pli ol 300 verdstelanoj el preskaŭ 30 landoj. Okaze de BET-52, la retejo „La Balta Ondo" publikigis serion da historiaj artikoloj kun fotoj pri ĉiuj antaŭaj litoviaj BET-oj tiamaniere elstarigante ĝin ne nur kiel simplan aranĝon, sed ĉefe kiel tutan fenomenon de esperantista agado en Baltiaj landoj. Ĝenerale, la informado pri BET-52 nacie kaj internacie antaŭ ĝi, dum ĝi kaj post ĝi estis vere eksterordinara. Estis publikigitaj pli ol 200 artikoloj en naciaj kaj esperantlingvaj eldonaĵoj. Estis bonega kunlaboro kun ŝtataj instancoj de Litovio kaj kun urbaj instancoj de Birštonas. Al la programo elstare kontribuis multaj reprezentantoj de esperantista elito el diversaj landoj. Tio ĉio estis rezulto de preskaŭ trijara tre zorga laboro de Litoviaj kaj alilandaj esperantistoj.

Sufiĉe aktiva estis la informado pri Esperanto en litovaj amaskomunikiloj – radioj, televidoj, ret- kaj paper-gazetoj.

Bone evoluas internaciaj kontaktoj de Litoviaj esperantistoj. Pli ol dudeko da litovianoj partoprenis la 101an UK en Nitra. Gražina Opulskienė instruis en Finnlando. Estas intensaj kunlaboraj kontaktoj kun la Kaliningradaj Esperanto-establoj: „La Ondo de Esperanto", „La Balta Ondo", eldonejo „Sezonoj" kaj „Radio Esperanto". Ekestis utila kunlaboro kun la Litovia membro de la Eŭropa Komisiono Vytenis Andriukaitis.

Fine de la kongreso Povilas Jegorovas enmanigis dankfoliojn al 16 litovaj esperantistoj, kiuj en 2016 festis siajn jubileojn.

En la diskuto pri la esperantista agado partoprenis Vilius Šidlauskas (Panevėžys), Palmira Lukoševičienė (Panevėžys), Audrys Antanaitis (Vilnius), Vida Kulikauskienė (Panevėžys), Algimantas Piliponis (Vilnius), Marijus Dilba (Vilnius).

Posttagmeze komenciĝis la Zamehof-Tagoj 2016. Ĝia ĉefa programero estis prelego de Vytautas Šilas *„Renaskiĝo de Litovia Esperanto-movado en la poststalina Litovio. La jaro 1956"*. Sekvis informoj kun demonstrado de bildoj de Taesok Choe pri Koreio kaj pri la 102a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta venontjare en Seulo. La vespero finiĝis per koncerto de koruso „Godos" el Panevėžys sub la gvido de Jelena Urbutienė, kiu kantis en la litova lingvo kaj en Esperanto.

La sekvan tagon okazis interŝanĝo de informoj kaj opinioj pri esperantista agado en Litovio kaj najbaraj landoj.

Dum la du aranĝoj funkciis riĉa libroservo, eblis aboni Esperanto-gazetojn kaj aliĝi al la 102a UK en Seulo, al la 53aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Liepaja (Latvio). Al BET-53 aliĝis 49 litovaj esperantistoj, al UK-2017 en Seulo aliĝis kvar personoj.

*Povilas Jegorovas*

# Renkonte al 2017



Kiel ĉiam la lastantan ĵaŭdon de monato, ankaŭ la 29-an de decembro en Litova Ĵurnalista Hejmo (Vilno, Jogailos str. 11) por adiaŭi la forpasantan jaron 2016 kunvenis membroj de Vilna Esperantista Societo. Ne ĉiuj – nur 12 apostoloj el la trideko da enlistigitoj. Sed ĉiam gravas ja ne kvantonombro, sed kvalito kaj boneco!

La kunveno komenciĝis per ekbruligo de tri nacikoloraj kandeloj (la flava, verda, ruĝa) kaj festparolo de la societa

prezidanto Algimantas Piliponis. Estas malfacile rememori ĉion dumkunvenan, ankaŭ la enhavon de la festparolo – neniu protokolis ĝin (kutime tion faras Irena Alijošiūtė). Estas pli facile noti kion faris mi mem – mi kantigis la kunvenintojn kaj prezentis al ili la kanton "Kristnasko sankta". Estas la kanto de famulo John Lennon "Happy Xmas" (angle "Feliĉan Kristnaskon") por kiu, post la Zamenhof-tagoj en Kaŭno, mi verkis E-vortojn.

Preskaŭ ĉiuj kunvenintoj gratul– aŭ bondezir-parolis. Mian bondeziron por la jaro 2017 enhavis la strofo de la kanto: "Novjare ni fartu kun ĝojo en kor' pri vivo honesta, sen tim' kaj dolor'!"

Ĉiuj festantoj venis kun etio por la komuna regala tablo. La sufiĉe longa festa vespero pasis jen rondside kantante, jen kunstare ĉe la regala tablo. Pokaloj da ruĝa vino inspiris al tostoj, kiuj ve ne estis registritaj (pro mia malbona memoro mi neniun el ili povas citi).

La disiro pasis en bona, optimisma humoro: la jaro 2017 estos nia jaro!

*Vytautas Šilas*



## Al membroj de LitEA 🗣 la jaro 2017 jam alvenis!

Tempo por pagi membrokotizon al LitEA, verŝajne, ankaŭ alvenis. Do, se vi volas ankoraŭ esti oficiala membro de la LitEA, ne forgesu pagi la membrokotizon de la LitEA!

Post la ekuzado de eŭroj en Litovio, membrokotizo fariĝis 10 eŭroj. Lernantoj kaj studantoj membrokotizon ne pagas.

Por pagi membrokotizon, bv. rekte kontakti la prezidanton de LitEA Povilas Jegorovas: pjegorovas@takas.lt.

## Grava informo!

Se vi volas ricevi freŝajn, ĵus-faritajn sekvontajn numerojn de ĉi tiu gazeteto, vi povas ankaŭ kontakti la redaktoron de la gazeteto retpoŝte.

## ☺Ridetu kune!

Viro plendas al sia amiko:
– Memoro de mia edzino estas terura!
– Ĉu ŝi nenion memoras?
– Male - ŝi memoras ĉion!

**Fontoj de artikoloj kaj bildoj:**

- Tradiciaj LitEA kongreso kaj Zamenhof-Tagoj 2016:

foto de Aleksejus Karpovas;
artikolo de La Balta Ondo (sezonoj.ru).

- Kristnaska bildkarto:

bildarchivaustria.at

**Redaktoro de la gazeteto:**
**Povilas Jasiūnas (ursecjo@esperanto.96.lt)**